NEUTRALA

# GRUPO ESPERANTISTA "FIDO KAJ ESPERO" VALLADOLID

AÑO 1995 ENERO-FEBRERO Num.160
DIRECCION POSTAL: Apartado 119; 47080 VALLADOLID
Adherido a la FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

===

## EDITORIAL

### A MODO DE MEMORIA

Cuando el Grupo contaba con una sede, más o menos decente, por estas fechas celebrabamos la Junta General en la que se daba a conocer la MEMORIA DE ACTIVIDADES, así como el Estado de INGRESOS y GASTOS, así como la elección de nueva Junta Directiva.

Desde hace unos años, por apatia de unos y dejadez de los más, no hemos procedido a la celebración de Junta General, aunque la actividad del Grupo ha continuado, en su más mínima expresión, que se reduce principalmente a la edición cada dos meses de un Boletín de cuatro o seis páginas con textos en español y en esperanto. Otra de las actividades fué la celebración del aniversario del nacimiento del creador del idioma internacional ESPERANTO, con una comida celebrada en el HOTEL IMPERIAL.

Por su parte, los socios Luis Pelayo y Cesar de Mosteyrin han aportado su "granito de arena" a la difusión de la existencia del Esperanto mediante artículos, entrevistas y comentarios publicados en la prensa.

Desde el pasado año, cumplimentando una petición recibida, el Boletín del Grupo se envia regularmente al Museo Internacional de Esperanto con sede en Viena (Austria).

En cuanto al movimiento de ingresos y gastos durante 1994 estos fueron de 27.619 pts y 13.386 pts. respectivamente.

ESPERANTO, EL IDIOMA INTERNACIONAL



## ADA FIGHIERA SIKORSKA

Nia samideanino Ada Fighiera estas konata de multaj el ni, ĉar ŝi estis en Valladolid, en 1982, kaj eĉ ŝi prelegis por nia Grupo "Fido kaj Espero". Sed internacie, Ada Fighiera estas tre konata kiel redaktorino de la prestiĝa periodaĵo "HEROLDO DE ESPERANTO", la plej ofta gazeto de nia esperanto-movado, kaj ŝi estis nomumita honora membro de UEA dum la pasintjara Universala Kongreso en Seulo (Koreio).

La vivo de Ada Fihiera estas tre interesa, kaj ŝi multfoje respondis al diversaj intervjuoj de diversaj esperantistaj ĵurnaloj, eĉ pri ŝia infanaĝoj, ŝi mem verkis libreton titolita "De tajgo al minaretoj".

La unua ekkono pri Esperanto venis al ŝi kiam studentino pri pola filologio en Varsovio, sed la definitiva eltrovo, estis dum la Festivalo de demokratia junularo okazanta en Varsovio en 1955. Tiel, pro la deziro havi kontaktojn kun la tuta mondo, ŝi lernis Esperanton en kurso gvidata de la fama poeto Julio Baghy en 1956 en Pollando. Poste, S-ino Fighiera gvidis kun S-ro Uspenski, esperanto-elsendon ĉe Pola Radio, kaj poste ŝi ekkonis sian estontan edzon, S-ro Gian Carlo Fighiera, en tiu momento Konstanta Kongresa Sekretario (KKS) de UEA. Ili geedziĝis, kaj de tiam ili multe laboris pro Esperanto.

Dum la kongreso en Halveto (Britujo) ŝi renkontiĝis al S-ro Teo Jung, fondinto de Heroldo de Esperanto, kiu jam aĝa, deziris trovi anstataŭanton por redakti la gazeton. Loĝanta en Bruselo, S-ino Fighiera ekredaktis la unuan numeron de HEROLDO kaj jam pasis pli ol 30 jaroj redaktante plensukcese ĝin.

Okaze de la translokiĝo de S-ro G.C. Fighiera al Madrido, pro laboraj kialoj, la redaktado de "Heroldo de Esperanto" ankaŭ translokiĝis kaj la madrida grupo "Madrida Esperanto-Liceo" havis la bonsancon ĝui la ĉeeston de la paro en iliaj kunvenoj, kaj mia edzo kaj mi, havis la sancon multfoje amike interparoli kun ili kaj ni gardas de la tempo kiam ili loĝis en Madrido, neforgeseblajn rememorojn, ĉar ne vane la hejmo de geedzoj Fighiera estis malfermita al la internacieco.

Nuntempe, ili loĝas en Italio, sed la persona afableco de amikino Fighiera, kaj la efikeco de ŝia agado en "Heroldo de Esperanto" restas la ĉiama.

M R URUEÑA

## TRA LA MONDO

★

### ASTERIKS EN ESPERANTO

Kiel certe vi scias, la aventuroj de Asteriks jam aperis en Esperanto, konkrete la bildstrio titolita ASTERIKS LA GAULO, sed de ĝia apero jam pasis pli ol 20 jaroj kaj vere, ĝi estis bone vendata inter la esperantistaro, ĉar kiel alilingvaj versioj ĝi atingis la intereson kaj la entuziasmon de la legantoj. Nun kroatia eldonejo planas eldoni jare 3 volumojn de la serio de aventuroj de la ruza Asteriks kaj lia fortega amiko Obeliks. La unua titolo aperonta estos ASTERIKS LA GLADIATORO. (El la numero 66 de EVENTOJ.)

### MIL UNUAJ VORTOJ POR INFANOJ

Esperanto Asocio de Britio eldonis multkoloran libron por infanoj prezentante la mil unuajn vortojn kiujn la infanoj uzas en Esperanto. La libro estas amuza kaj klara.

### ASTEROIDOJ ZAMENHOF KAJ ESPERANTO

En la zono de la sunsistemo inter orbitoj de Marso kaj Jupitero cirkulas miloj de asteroidoj. La astronomoj observas kaj registras en observatorioj tiujn objektojn kaj la rezultoj estas publikigataj en internaciaj fakaj gazetoj. Tiel estas registritaj du asteroidoj, nome, Esperanto kaj Zamenhof.

En la revuo "Asteroida cirkulero", de la Universitato de Cincinnati, de 26-1-56, aperas informojn pri tiuj asteroidoj menciante sian numeron, la nomon de la eltrovinto kaj klarigante la kialon de la nomo. La eltrovinto estis elstara finna esperantisto Prof. Välsälä.

### PASKO EN GERMANIO

De la 14 ĝis la 21 de aprilo 1995 okazos en Waldfichbach la 11-a Printempa Semajno Internacia. La programo celas kontentigi diversaĝulojn.

La seminario okazos en moderna komforta domo kun aktualaj instalaĵoj.

### LA PAPO SALUTIS EN ESPERANTO

Denove la Papo salutis la mondon okaze de Kristnasko kaj Novjaro, en diversaj lingvoj, inter ili, Esperanto kiun li menciis la lastan antaŭ la pola, lia propra lingvo.

Boletín FIDO kaj ESPERO.

## DE INTERES PARA LOS SOCIOS

Se recuerda a los socios del Grupo Esperantista "Fido kaj Espero" que pueden hacer efectivo el pago de la cuota anual MIL PESETAS (1.000 Pts) como mínimo, mediante ingreso en la Cta. Número 2369421600 de CAJA ESPAÑA.

Una vez recibida notificación del pago, se enviará el recibo acreditativo.

**PERIODICO**




Grupo Esperantista
Apartado, 119
47080 VALLADOLID

Valencia Esperanto Federacio
Gran Via Fernando Católico 45
46008 VALENCIA